

EŬROPA FERVOJISTA ESPERANTO KONFERENCO
1a - 7a de oktobro 1990 - SPA (Belgio)

Konstanta adreso : Lucien DE SUTTER
Avenue Kersbeek 90
B - 1190 BRUXELLES
Tel.(02) 332 08 68

Poŝtĉekkonto : 000-0477076-30 de BEFA
p/a Lucien DE SUTTER

Ĉar ne ĉiuj havas la eblecon aŭ la ŝancon partopreni ĉu en la 42a IFEF Kongreso en Hamar (N), ĉu en la 75a Universala Kongreso en Havano (C), kelkaj IFEF-landaj sekcioj kaptis la okazon organizi tutsemajnan kulturen kaj turisman aranĝon.

Kie ? En SPA, perlo de la Ardenoj, famkonata por ĝiaj fontoj, termobanoj, pura aero kaj kvieteco.

Kiel kongresejo kaj restadejo, ni elektis la feriejon "Sol Cress", je 370 metroj super la marnivelo, ĉe la rando de arbaro de 1300 hektaroj. Ĝi estas elirpunkto de signalizaj promenadoj.

Kiam ? La unua semajno de oktobro en la komenco de aŭtuno, kiam la naturo estas ankoraŭ pli bela, do de lundo la unua ĝis dimanĉo la sepa.

Kiel ? Temo de la konferenco : La Fervojoj kaj la Granda Eŭropa Merkato de 1992.

Sed alloga programo agrabligos la aranĝon, tage kaj vespere.

Dekduo da partoprenantaj IFEF-landaj sekcioj certigos veran internacian etoson en amika rondo.

Kompreneble ankaŭ ne-fervojistaj esperantistoj estas bonvenaj.

PROVIZORA PROGRAMO


	Mallongigoj
	AM - Antaŭtagmeze
	TM - Tagmeze
	PM - Posttagmeze
	V. - Vespere
Lu.01. Alveno de la partoprenantoj Interkona vespero	
Ma.02. AM Vizito de la merkato de SPA PM Unua faka kunveno V. Nikolin ¹ (Nicole Pairoux) kantas por ni	
Me.03. Tuttaga ekskurso al Luksemburgo Folklora vespero	
Ja.04. AM Serĉpromenado SPA - Akcepto en la urbodomo PM Duontaga ekskurso en la belgaj Ardenoj V. Operetaj kantoj : Sopranino, Barbara Kohl el Luksemburgo Tenoro, L. Fluck el Germanio	
Ve.05. Tuttaga ekskurso al Germanio : Monschau - Aachen Vespermanĝo ĉe kandeloj V. Kantvespero de Gerry Schavemaker (FERN) Filmo pri la 150a datreveno de la Nederlandaj Fervojoj	
Sa.06. AM Dua faka kunveno PM Promenado per strat-trajneto aŭ arbar-piedpromenado V. Bankedo kaj balo kun partopreno de la fanfaro de la Nederlandaj Fervojistoj (100 muzikistoj)	
Di.07. AM Promenado al la centro de SPA kie ludos la fanfaro de la TM Lasta komuna tagmanĝo /Nederlandaj Fervojistoj PM Adiaŭo kaj rehejmiĝo	

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto plenigu apartan aliĝilon.
Se aliĝilo ne estas je dispono, b.v. uzi samformatan paperon.
2. Bonvolu skribi tajpe aŭ preslitere. Donu ĉiujn petitajn detalojn.
3. Sendu la aliĝilon al la konstanta adreso (vidu paĝo 1).
4. Sendu la partan antaŭpagon de 1000 BEF (mil belgaj frankoj) al la poŝtĉekkonto de BEFA (vidu paĝo 1).
Ni metos en la debeto de via konto ĉiujn eventualajn bankajn aŭ aliajn okazintajn enspezkostojn.
5. Pagante por alia persono, kiu sendas apartan aliĝilon, menci la manieron de enpago, kaj necesajn detalojn de la koncerna persono !
6. Aliĝilo estos traktata nur post la parta antaŭpago de 1000 BEF.
7. La parta antaŭpago de 1000 BEF ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la aranĝon.
La saldon vi pagos plej malfrue je alveno.
8. Ne estas aliĝkotizo, sed la prezoj ne estas divideblaj.
La ofertoj inkluzivas : ĉu la tutsemajnan aranĝon, ĉu la semajnfinan aranĝon laŭ ties menciitaj prezoj.
Prioritaton ni konsentas al tiuj, kiuj aliĝas por la tutsemajna aranĝo, t.e. de la 1a ĝis la 7a de oktobro.
9. La ricevon de viaj aliĝilo kaj enpago ni konfirmas per alsendo de via kongreskarto.
10. La kongreskarto estas legitimilo. Oni nepre kunportu ĝin !
Oni ne rajtas trans/pruntedoni, interŝanĝi aŭ vendi kongreskarton !
11. Bonvolu noti, en via propra intereso, kion vi mendis kaj enpagis.

KONDIĈOJ

- | | |
|--|--|
| 1. <u>Tutsemajna aranĝo</u> : 01-07.10. | } En dupersonaj ĉambroj kun unu banĉambro kaj necesejo po 2 ĉambroj.
(En unupersona ĉambro, 150 BEF pli po nokto) |
| - De la vespermanĝo de lundo la 1a ĝis la tagmanĝo de dimanĉo la 7a inkl. | |
| - du tuttagaj ekskursoj | |
| - duontaga ekskurso | |
| - bankedo (trinkaĵoj ne inkluzivaj) | } Ĝis 31a Ekde 1a de julio de aŭgusto |
| - kulturaj kunvenoj kaj distraj vesperoj | |
| - loĝado kun plena pensio inkl. trinkaĵoj = /biero/akvo. | |
| 2. <u>Semajnfina aranĝo</u> : 05-07.10. | |
| - De la vespermanĝo de vendredo la 5a ĝis la tagmanĝo de dimanĉo la 7a inkl. | } 5000 BEF 5300 BEF |
| - bankedo (trinkaĵoj ne inkluzivaj) | |
| - loĝado kun plena pensio inkl. trinkaĵoj = /biero/akvo. | |
| Vi povas elekti la loĝadon laŭ : | |
| - <u>ekonomia servo</u> kun la prezoj ĉi-supre menciitaj. Vi devas mem purigi vian ĉambron, fari vian liton kaj kunporti tualettukojn. | |
| - <u>hotela servo</u> kun ekstrapago de 250 BEF po tago kaj po ĉambro. | |
| La centra personaro purigas vian ĉambron, faras vian liton kaj zorgas la tualettukojn. | |




F E R V O J E A L S P A

SPA situas sur la fervojlinio 44 de Verviers Central al SPA kun kaden-cita horaro = unu trajno ĉiun horon.
Veturdaŭro : 21' (minutoj).
Ĉiuj trajnoj inkl. internaciaj haltas en Verviers Cal kie vi tuj havas koneksan trajnon al SPA kaj inverse.



EŬROPA FERVOJISTA ESPERANTO KONFERENCO "Sol Cress" SPA (B) 01 - 07 oktobro 1990



A L I Ĝ I L O (por unu persono)
Sendota al : Lucien DE SUTTER
Avenue Kersbeek 90
B - 1190 BRUXELLES

Mi aliĝas al : - la tutsemajna aranĝo (01-07.10.90) (*)
- la semajnfina aranĝo (05-07.10.90) (*)

de la Eŭropa Fervojista Esperanto Konferenco de SPA (B) kaj konfirmas la poŝtĉekan partan antaŭpagon de 1000 BEF.

S-ro/S-ino (*) Antaŭnomo

Adreso

Poŝta kodo Urbo Lando

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo (*) / Mi deziras loĝi kune kun (*)

S-ro/S-ino (*)

Adreso

(*) Forstreku la nekonvenajn.
 Metu krucon en la taŭga fako. Nepre plenigu ankaŭ la dorsan flankon !


A ŬTOMOBILE AL SPA

Skemo de la ĉefaj aŭtovojoj al SPA.

En la feria centro "Sol Cress", granda aŭto-parkejo estas je la dispono de la aŭtomobilistoj.



CENTRE DE LOISIRS ET DE FORMATION
Feria & Kongresa Centro
 Tel. 087/77 23 53



Mi ŝatus loĝi en unulita ĉambro (*). Tamen se unulita ĉambro ne plu estas disponebla, mi konsentas tranokti en dulita ĉambro kune kun: S-ro/S-ino (*)

Mi elektas : la ekonomian servon (*), la hotelan servon (*)

Mi alvenos la . . /10/90, je la horo,

- trajne, en la stacidomo SPA (*),

- aŭtomobile, en la feria centro "Sol Cress" (*).

Dato Subskribo

(*) Forstrecku la nekonvenajn.

Metu krucon en la taŭga fako.

Atente legu la ĝeneralajn instrukciojn.

Rezervita al LKK
